

**ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »**

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux



Prezidanto : **Bernard SARLANDIE**
24 rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN
Tél : 06 83 29 40 13
Mail : bernard.sarlandie@gmail.com

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : **Monique DUSSENTY**
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr



LEGI

JULIO 2013



N° 135

La « Espéranto-Gironde » Informilo

***Dum nia renkonto en Gujan Mestras, dimançon la
30an de septembro, la estraro de Espéranto-
Gironde, konsistante en la prezidanto kaj la kasis-
tino, fiksas la daton de la venonta Ĝenerala Asem-
bleo :***

***Dimançon la 29a de septembro 2013
en la urbo CREON
ĉe nia amikino
MORINE***

PRI LA DUOPA KONGRESO EN ARTIGUES

Plaĉis al mi unue la ideo de duopa kongreso far IFEF kaj Esperanto France.

Tia organizo, flanke de la respondeculoj, permesas ŝpari monon kaj energion. Por la partoprenantoj, la renkonto estas pli riĉa, la kontaktoj pli diversaj . Kaj tiuj kiuj apartenas al la du asocioj ankaŭ ŝparas monon kaj tempon partoprenante sur la sama loko en la du Generalaj Kunsidoj .

Estis por mi agrabla okazo por praktiki la universalan lingvon parolante kun malnovaj amikoj . Plaĉis al mi la kultura programo. La okcitana vespero estis ege agrabla ; tre specialan viziton de Bordoza pere de la maskaranoj, lerte prezentis Marcelo kaj Klodin.

Marielen kaj ŝia grupo Maragane regalis nin per regiona tradicia muziko . Ni plezure malkovris la talentojn de Marielen kiu kantis kaj muzikis per pluraj muzikiloj .

La koncerto de Kajto Duope ne tro surprizis min ; ili estas profesiuloj kaj tre simpatiaj personoj kiuj facile komunikas varmkoron . Estas vera plezuro aŭskulti ilin kaj kunkanti kun ili.

Interkant ankaŭ plaĉis al mi. Mi ŝatis la kantojn kaj ankaŭ la tre klaran elparolon de Robin . Kaj kompreneble mi ŝatis « La sekreton de la magia trajno ». Ni bone sukcesis nian prezentadon. Mi havis plezuron ludi sed ankaŭ travivi la preparadon meze de amikeca etoso .

Esperanto-Gironde , malantaŭ Marcelo , amplekse kaj efike helpis antaŭ kaj dum tiu duopa kongreso. Se aliaj E.Federacioj aŭdas pri tio, ili eble siavice demandos al ni por kongresi en Artigues !!... Despli ke , proksime al nia kongresejo, staras hospitalo kie laboras esperantista flegistino !!..Ĝirondio vere estas taŭga loko por akcepti geesperantistojn !

Joël

La lingvoj ĉiam malkunigis la popolojn
El plej malgranda preteksto, konflikto, milito,
Esperanto respektas ankaŭ la plej humilajn
Ĝi kunligas ĉiujn homojn tra la mondo!

Interŝanĝo, malgranda paŝo al aliulo,
Oni ne postulas de vi superhoman penon,
Por amo, paco, estu ni bonkoruloj,
Feliĉon ĉiuj infanoj ĝuos morgaŭ.

Arbo kreskas eĉ malantaŭ la montaroj
Rivero ne apartigas tiujn kiuj sin amas
Ni ne lasu niajn lingvojn kraĉi atakemon
Esperanto estas nia estonto sen malamo.!

*Esperanto ? Antaŭtagiĝo de espero
Kaj sunsubiro de Bel Canto,
Ci ignoras la landlimojn
Por kunigi la esperantan popolon.*

ESPERANTO

Les langues ont toujours séparé les peuples,
Le moindre prétexte, un conflit, une guerre,
L'espéranto respecte aussi les plus humbles,
Il relie tous les hommes sur cette terre !

Un échange, donc un petit pas vers l'autre,
On ne vous demande pas d'efforts surhumains,
Pour l'amour, la paix, soyons bons apôtres,
Le bonheur de tous les enfants est pour demain.

L'arbre pousse bien au-delà des montagnes,
La rivière ne sépare ceux qui s'aiment!
Ne laissons nos langues cracher la hargne,
L'espéranto c'est notre avenir sans haine !

*Espéranto ? Aube de l'espérance
Et coucher de soleil du Bel Canto!
Tu fais fi des frontières de France,
Pour unir le peuple d'espéranto!*

Jean ARANZASTI

Ekstraktaĵo el mia dekdu paĝa kongresa tagĵurnalo : (...)

Lundon la 06an de majo : la senvualigita sekreto

21:03 La trajneto malfruas. Tamen magio transportos ĉiujn: aktoroj kun publiko.

La plej bela sekvo de tiu spektaklo estas aŭdi UFE-kongresanoj bedaŭri, ke ili ne spektis tiun spektaklon, ĉar ili alvenis nur merkrede. Ili aŭdis nur tre bonajn komentojn. Iu eĉ demandis, ĉu La Kompanoj ne povus prezenti resumon dum la vendreda libera vespero? Kaj kunorganizantoj de la UK 2015 en Lille atendas proponon de la Kompanoj por sia kultura programo. Interkant'antino el Angers admiris la tuton kaj demandis, kiom longe La Kompanoj preparis kaj kiom ofte ni provadis. Ŝi ne povis kredi la respondon, ke neniam la projekto sukcesis grupigi ĉiujn aktorojn kaj muzikantojn. Eĉ ne dum la spektaklo mem! Vere multaj fervojistoj estis kortuŝitaj de la Kompanoj. Ni estas eĉ konsiderataj pli fervojistaj ol certaj realaj dungitoj de fervojkompanioj. (...)

Konklude :

Kompreneble la ĝenerala konkludo estas tre pozitiva: amikeco plifirmigis sincerajn homajn rilatojn inter esperantistoj kun homoj jam konataj kaj kreis kun aliaj tute novajn. Organizado de internacia kongreso ĉiam atestas pri la valoro de la lingvo esperanto kaj ties homarana idealo. Nia loka grupo Esperanto-Gironde ĉiam pligrandiĝas post tiaj okazaĵoj. Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la sukceso.

Marcelo

PS. Kaj nun ? ĉu vi antaŭvidas sekvon ? Kiun ? Ni atendas viajn proponojn dum la ĝenerala asembleo ! "

La 65-a IFEF-KONGRESO

Temo de la kongreso: **Rolo de la fervoj en la disvolviĝo de la moderna mondo.**

Ĝi okazis en la sudokcidenta parto de Francio de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 en *Artigues près Bordeaux* (Artigues ĉe Bordoza) Samtempe kongresis UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto). Esperanto harmonie kunigis la du asociojn. La aranĝojn partoprenis pli ol 250 geesperantistoj el 17 landoj. Al la kunorganizado multe helpis la ĝirondia Esperanto-grupo, kies prezidanto estas Bernard Sarlandie. Pri altkvalitaj kulturaj programeroj en kiuj rolis ĉiuj grupanoj zorgis precipe Marcelo Redoulez kun Claudine Pomiro. Jam la nekutima interkona vespero donis imagon pri io eksterordinara. Kaj tiel efektive estis dum ĉiuj vesperaj kulturaj programeroj. Multaj surprizoj atendis nin. Al interkoniĝo kontribuis per akordiona muzikado kaj E-kantoj la konata franca esperantisto FAMO.

En la dimanĉa solena inaŭguro honorigis nin la vicprezidanto de la ĝenerala konsilio Jean-Marie Darmian. La bonvenigon de la ĉeestantoj komencis la prezidantino de LKK (Loka Kongresa Komitato) Sylviane Lafargue. Salutis Rodica Todor - la prezidantino de IFEF, Claude Nourmont - la vicprezidantino de UEA, Bernard Sarlandie - la prezidanto de ĝirondia E-grupo, Stefan Mac Gill nome de ILEI. Sekvis kantado de E-himno kun akordiona akompano de FAMO. Post la paŭzo komenciĝis salutado de ĉiuj reprezentantoj de ĉeestantaj landaj asocioj, kaj oni legis ret-alvenintajn bondezirojn de gravaj organizaĵoj kaj unuopuloj. Inter kiuj ankaŭ tiu de Probal Dasgupta la prezidanto de UEA. Antaŭ la fino Rodica Todor honorigis kaj transdonis diplomojn al Jeannine Daguin, Bernard Sarlandie kaj Marcelo Redoulez pro ilia meritplena laboro por Esperanto. Post la tradicia komuna fotado ĉiuj estis invititaj al aperitivo okazanta antaŭ la restoracio. Sunbrilo aperis sur ĉiuj vizaĝoj.



DIMANĈON LA 30AN DE JUNIO 2013
ĈE NIAJ ESPERANTISTAJ AMIKOJ
EN GUJAN MESTRAS



Estis belega tago apud la arkaŝona baseno. La esperantista grupo de Gujan Mestras akceptis la ĝirondanojn, kaj ankaŭ la ĉarentanojn, en tiu ĉarma urbeto kiun ni vizitis matene. Post manĝo, abunda, en la salono kie okazas la kursoj, (dankon al Yvette kiu regalis nin per freŝaj ostroj), Bernard Vidal prezentis al ni novan ludon kreitan de li, kun multaj klarigoj (sekvota afero).

La posttagmezo vidis la grupon, kapon levitan, en la stratoj de Arkaŝono, post agrabla vojaĝo per trajneto. Belaj vilaoj en la malnova kvartalo, parkoj, novaj domoj en la turisma parto ĝis la baseno, ĉiam sub la gvidado de Bernard Vidal. Kaj ĉiam suno, blua ĉielo, varmo, ĝoja etoso. Dankon al ĉiuj por tiu bela renkonto, kaj specialan amikan saluton al Pedro Sevilla, la plej malnova ano de la asocio, kiu plezurigis nin per sia ĉeesto.



Monique



POR MISRIDI...

Ĉu, observante personojn samaĝajn kiel vi, vi jam kulpis pensante : *mi ne ja aspektas tiel maljuna !* »

Do vi ŝategos tiun rakonton.

Mi sidis en la atendejo por unua rendezuo ĉe mia nova dentisto, kiam mi rimarkis lian diplomon kroĉitan ĉe muro. Legante lian nomon, subite mi rememoris grandan brunulon. Kvardek jarojn antaŭe, ni ĉeestis en la sama liceoklaso ; ĉu eblas ke li estis la knabo por kiu mi amsopiris tiuepoke ?

Enirante la kuracoĉambron, mi tuj forpelis tiun eventualan. Tiu viro, griziĝanta, kalviĝanta, la vizaĝo faltoplena, estis tro aĝa por esti mia sekreta amo !

Tamen....Post la ekzameno de mia dento, mi demandis :

- Ĉu vi vizitadis la liceon Henriko la kvara ?

Li respondis :

- Jes !

- Kiam vi trapasis vian abituron ?

-1972 ! kial tiu demando ?

- Nu, vi estis en mia klaso !

Kaj tiu **malbela maljuna aĉulo** demandis al mi :

-Pri kio vi instruis ?

!

Dum la semajno okazis fakaj prelegoj, komitat-kunsidoj, diversaj labor-kunvenoj, oni pritraktis movadajn aferojn, prezentis novaĵojn el fervoja mondo. Kundiskutis terminara komisiono, okazis ILEI sesio pri la projekto de E-kurso ne nur por fervojistoj. Tre allogaj estis la prezentoj de la venontaj IFEF-kongreso en Italio kaj tiu de UEA en Lillo. Oni spektis filmon pri Esperanto kaj mallongan humuran desegno-filmeton "La bariergvardistino". Daniel Moirand tre lerte rakontis pri "Mil kaj unu noktoj". Stefan Mac Gill prelegis pri "Rolo de la fervojo en moderna mondo", Michel Lafosse tre kompetente kaj detale prelegis pri "Bordoza tramo". Lia prelego kompletigis antaŭan viziton de kelkaj interesuloj al la tram-prizorgejo. Ili konstatis grandan similecon kun trajn-riparejo. Robert Combes kun sia edzino prezentis bildojn pri la konstruado de la "Viadukto des Fades", nuntempe jam ne funkcianta. Mireille Grosjean parolis pri "Japanaj trajnoj", Andrej Grigorjev el Kranojarsk pri "Siberia fervojista sindikato", Pjer Buvje pri la "Unua libro kaj la Bona Lingvo", Marcelo Redoulez pri "Bordoza Maskeronoj". Bone funkciis libroservo, okazis ekumena Diservo. La prezidanto de la ĝirondia E-klubo Bernard Sarlandie kontaktis ĵurnalistojn kaj oni aperigis artikolojn pri Esperanto. Aperis tri numeroj de kongresa bulteno. Estis reelektita la ĝisnuna estraro por trijara periodo. Ankaŭ UFE elektis kaj prezentis novan estraron kaj pridiskutis siajn movadajn aferojn.

Al agrabla postagmezo-fino kontribuis la muzikgrupo "Maragane" instruante gaskonajn dancojn. Alian tagon same entuziasme instruis kantadon Ankie kaj Nanne - la duopo el Kajto. Ambaŭ grupoj prezentis vesperan koncerton. Ili plezurigis la ĉeestantojn - pri tio atestis longaj varmaj aplaŭdoj. En aliaj vesperoj temis pri lirikaĵoj de Morine Stride kaj plaĉaj kantoj kun pian-akompano de Isabelle. Tre amuzan spektaklon "La sekreto de la magia trajneto" prezentis kanta kaj teatra trupo "La Kompanoj" de Esperanto-Ĝirondio. Ĝi estis speciale kreita por la fervojista kongreso. Bankedo plensatigis ĉiujn kiuj partoprenis ĝin. Tripersona fervojista orkestro dancigis kelkajn ĉeestantojn. Al la internacia vespero kontribuis la ĉeestantoj per kantoj, poemoj, mallongaj rakontoj kaj muzikado.

Okazis pluraj duontagaj ekskursoj dum kiuj ni vizitis (perpiede aŭ el panorama buso) la belan urbon Bordoza. Alia interesa vizito gvidis nin al la rava mezepoka urbeto *Saint Emilion* (Sankta Emiliono) situanta en la koro de la bordoza vitejo. Ĝi estas konata ĉefe pro bona ruĝa vino, kiun ni ĉe la fino de la vizito gustumis. Alia tiea specialaĵo por frandemuloj estas makaronoj. Nu, la urbeto riĉas je historio. La plej interesa malkovro por ni estis vizito de la plej vasta monolita preĝejo en Eŭropo. Aliaj ekskursantoj partoprenis viziton al la Citadelo de Blajo.

Marde la tuttaga ekskurso kondukis nin al Arkaŝono. Tie ni surgrimpis la dunon *Pilat* por spekti vastan ĉirkaŭaĵon - unuflanke arbaron, aliflanke maron. La sablo estas tre fajna. Ŝippromenado tra la arkaŝona golfeto ebligis vidi la dunon de alia flanko. Ĝi etendiĝas je distanco de 2,7 kilometroj kaj altas pli ol 100 m super la marnivelo. Bonege ni tagmanĝis en loka restoracio.

Alia tuttaga ekskurso vizitigis al partoprenantoj la subĉielan landezian vilaĝon Markvezo. Ambaŭ ekskursoj estis riĉenhavaj kaj ĉiuj partoprenantoj estis tre kontentaj.

Post la solena fermo kaj transdono de la kongresa flago la fama koruso "Interkant" prezentis tre interesan spektaklon pri la opero *Karmen* sub la gvido de Franjo Lévèque.

La postkongresa ekskurso kondukis nin al *Pauillac* (Pojako), kie ni iom aventureme enŝipiĝis por atingi la insuleton *Patiras* (Patiraso). Tie ni ekologie tagmanĝis laŭ ne kutima maniero - sen manĝilaro. (Tiamaniere estas ŝparata 40 litroj da akvo por persono). Ĉio bongustis. Al bonhumoro kontribuis Kajto.

Konklude: ambaŭ kongresoj estis tre sukcesaj kaj oni havis okazon ekkoni novajn samideanojn. Alia pozitiva afero estas, ke kelkaj esperantistoj membriĝis ĉe IFEF kaj estis akceptita nova landa fervojista asocio en Kubo. Pro tre alloga prezento fare de italoj kelkaj entuziasmoj (ne fervojistoj) jam aliĝis al la venonta IFEF-kongreso okazonta en la itala urbeto *San Benedetto del Tronto* situanta 300 km sude de *Bologna*. Aliĝu ankaŭ vi, ĉar la italoj garantias belan sunan veteron kaj buntan programon!

Ni ĝuis tre agrablan semajnon enhavantan riĉan programon, interesajn kulturajn programerojn sukcesplene preparitajn de lokaj geesperantistoj. Grandan dankon al ili.

Liba Gabalda



La tri kuraĝuloj, kun la piedoj en la akvo ...

La Forumo de la Asocioj, en Cenon, okazis sabaton la 8an de junio.

La diversaj budoj troviĝis sub grandaj tendoj en la parko Palmer, sed la vetero ne rendevuis kun ni, ĉar pluvis de la mateno. Baldaŭ pluvo, vento, malvarmo trudis nin al frua forsaviĝa diskurado ĉirkaŭ la 15a horo.

Ĉiel, pro tiu bedaŭrinda okazo, la promenantoj estis maloftaj, sed, tamen, ni vidis du aŭ tri personojn interesatajn kaj disdonis plurnajn dokumentojn.

Monique

L'opéra "Carmen" en espéranto

Le concert-conférence créé autour du contexte politique et culturel qui a donné naissance au mythe de Carmen, et dont Bizet en connut la gloire posthume, présenté dimanche en fin d'après-midi à la salle des fêtes, a été longuement applaudi par les très nombreux spectateurs qui avaient répondu à l'invitation des organisateurs.

Les chants principaux des quatre actes de l'opéra Carmen ont été interprétés par le chœur espérantiste interrégional Interkant' qui regroupe quarante-cinq chanteurs et musiciens et les élèves du cours élémentaire de l'école de Bouresse. Pour promouvoir la culture et la langue espérantiste, la partie chantée a été présentée en espéranto et la partie conférence en fran-



Les élèves de l'école de Bouresse et les choristes d'Interkant'.

çais. Durant le spectacle, les danseuses, chanteurs et musiciens n'ont rencontré aucune barrière linguistique. Ce premier concert donné à Bouresse a permis aux organisateurs

« de faire exploser l'opéra dans un lieu où il n'a pas habituellement accès et cela en permettant un dialogue avec d'autres formes artistiques liées à la musique et aux voix ».

> Prochains rendez-vous du centre Kvinpetalo : du 12 au 18 juillet, stage de musique avec la famille Markov, qui s'achèvera par un concert. Il n'est pas nécessaire d'être musicien professionnel ou amateur de haut niveau pour y participer. Du 22 au 26 juillet, pratique de l'espéranto pour débutants et faux débutants et pour 2^e niveau. Du 12 au 17 août, dans la nature avec Alan Favre, mycologue.

Renseignements ou inscriptions aux stages : Espéranto centre Kvinpetalo, 15, route du Lavoir à Bouresse, tél. 05.49.03.43.14.

Post METABIEF en Juraso, ARTIGUES en Ĝirondio, INTERKANT prezentis sian spektaklon « ĈIRKAŬ KARMENA » en la malgranda urbeto BOURESSE en la departemento Vieno.

Tri aliaj prezentoj atendas la « artistojn » : en PLOUEZEC en Bretonio en aŭgusto, en LAVELANET en Arieĝo fine de Oktobro, kaj la lasta en LE MANS en la departement Sarthe, en decembro.

Monique



Fotoj kaj aranĝis Liba kaj Fioral Gabalda

Fotoj afable senditaj de Liba GABALDA

Post nia spektaklo...

Fakte, por mi, la spektaklo estis nur unu parto de miaj agoj por la 65a IFEF kongreso. Ni laboris pri tiu kongreso ekde septembro 2011, kaj mi devis ankaŭ regule kontakti la amaskomunikilojn, la oficiulojn, kaj prepari la vizitojn de Bordo buse kaj de la Arcaŝona golfe-to. Tiun lastan mi fiaskis, precipe la ŝipadon, sed la ŝipanoj, tre afa-ble, ŝajnis kontentaj.

El tiuj agadoj, mi tre ĝojis akcepti Jean-Marie DARMIAN, la vic-prezidanto de la Ĝenerala Konsilio, ŝatis lian paroladon dum la sole-na malfermo, la fotojn sur Fasbuko, kaj ŝategis lian verkon sur lia ta-ga reĵurnalo, la saman tagon. La kongresbulteno ankaŭ menciis tion.

Kiel mi jam diris, mi estis ano de *La Kompanoj* je la komenco, do mi ne tro timis pri nia spektaklo, eĉ se mi dubis iomete je la ko-menco pro manko de preparado tra provludoj. Sed ĉio glate disvol-viĝis, kaj ni ĉiuj povas fieri pri la rezulto. Mi eraris post Casey Jones, kaptante la sklavan ĉapelon tro frue, sed oni diris al mi, ke tio ne estis notita de la spektantoj.

Post la spektaklo, mi surprize malkovris amikojn de ni, kiuj sciis pri tiu spektaklo pere de Fasbuko.

Nun, post lasta vizito de Bordo, mi denove preparos nian spek-taklon en la Franca por la 23an de Junio en Le Haillan. Bonvenon al ĉiuj.

Bernardo, la 8an de majo 2013

.....
.....

Koncerne la tutan semajnon, mi gardos en mia memoro im-preson de vera kaj sincera kamaradeco inter ĉiuj partoprenantoj. Kaj certe la neesperantistaj teknikistoj Jean Paul kaj Williams intuicie sentis tion. Iom da magio blovis ne nur lundon sur la ma-gia trajneto sed ankaŭ la tutan semajnon en ĉiuj aranĝoj.

Claudine

"REFUSONS LE SABORDAGE DU FRANCAIS"

par Claude Hagège (professeur au Collège de France)
LE MONDE • le 25 avril 2013

La France n'est certes que la source historique, et non la propriétaire exclusive de la langue française, que partagent avec elle, à travers le monde, les soixante-dix-sept Etats et gouvernements constituant ensemble l'Organisation internationale de la francophonie (OIF). Du moins jusqu'ici. Car le projet de loi Fioraso, qui veut imposer, en faveur de l'anglais, une très large extension des exceptions au principe du français langue de l'enseignement, des examens et des concours, pourrait avoir pour conséquence, du fait de la valeur symbolique d'un acte de sabordage du français par la France officielle elle-même, un doute croissant quant à la légitimité de la promotion de cette langue par les autres pays francophones. Heureusement, quelques espoirs subsistent : le directeur du Salon du livre du Beyrouth me disait, à la fin d'octobre 2009, en un français aussi classique que sa voix était sereine et teintée d'ironique mépris : "Laissez là vos alarmes : si la France torpille le français, d'autres pays seront toujours là pour le revigorer et galvaniser sa diffusion !"

On se demande, pourtant, d'où peut bien venir, en France, cet acharnement contre la langue française. De la monarchie à la République, surtout aux heures les plus tragiques de cette dernière, tout illustre ce dicton : "C'est par sa langue que vit une nation." Les dirigeants de la nation française sont-ils donc saisis d'une pulsion d'autodestruction ? A supposer que tel ne soit pas le cas, tout

francophone lucide ne peut qu'adresser aux gens de pouvoir à Paris et aux intellectuels malvoyants qui les inspirent, le message suivant : "N'entendez-vous pas s'esclaffer les étudiants étrangers que votre exorbitante et naïve assurance prétend attirer dans vos universités et vos écoles par un enseignement en anglais, alors qu'il n'y est pas langue maternelle ? Ne voyez-vous pas que les mieux informés d'entre eux commencent à avoir pitié de votre dérisoire servilité face aux mécanismes du profit, et à se demander quelle déplorable aliénation vous torture, alors qu'ils respectaient jusqu'ici la culture et la langue françaises ? Allez-vous protéger enfin vos tympanes contre les sirènes des universitaires liés par des conventions avec des établissements anglophones, et qui n'ont pas encore compris que c'est en utilisant le français qu'ils accroîtront le prestige de leurs travaux, et non en mordant le sol devant l'anglais ?"


Le français est depuis le XIIIe siècle une langue à vocation internationale, d'abord européenne, puis levantine, puis mondiale. Il

est aujourd'hui la seule langue, avec l'anglais, qui soit présente sur les cinq continents. Chaque réunion de l'OIF montre que la promotion du français encourage celles de toutes les autres langues des pays membres. Madrid, Lisbonne-Brasilia, et maintenant Pékin dressent, face à la résistible domination de l'anglais, l'arme irrésistible de la diversité. Et c'est à ce moment même que la France, qui possède une longue antériorité historique dans l'illustration de sa langue, devrait sacrifier cette dernière aux pauvres pièges de l'argent ? !

Il est encore temps de réagir devant le burlesque en passe de devenir le consternant. Il est encore temps de se mobiliser avant qu'un projet de loi porteur du cancer ne soit proposé à la représentation nationale. Une partie grandissante du public bien informé est en train de se dépendre du vertige de l'américanisation déguisée en mondialisation. L'Académie française, elle aussi, dénonce un projet suicidaire.

Quant aux masses françaises, abreuvées de sous-culture américaine,

elles ne manifestent aucun désir de substituer l'anglais au français dans l'enseignement en France. Ce sont donc les forces vivantes et majoritaires du pays que l'on insulte en plaçant l'anglais sur un piédestal dont il n'a que faire, surtout venant du gouvernement français. Battons-nous pour notre langue ! Car même si l'enjeu est aussi d'éviter, par solidarité civique, aux autorités de sombrer dans le grotesque en même temps que dans l'indignité, c'est de notre identité qu'il s'agit. Il n'est plus temps de clore nos paupières : nous sommes en guerre ! Lire le débat Université, "pourquoi une nouvelle réforme ?", avec les contributions de Geneviève Fioraso, ministre de l'enseignement supérieur et de la recherche ; Valérie Pécresse, ancienne ministre de l'enseignement supérieur ; des professeurs d'économie ; Jean-Louis Fournel, professeur à l'université Paris-VIII et ancien président du collectif Sauvons l'université ! ; Claude Hagège, professeur au Collège de France ; Gilbert Béréziat, président honoraire de l'université Pierre-et-Marie-Curie...



ESPERANTO-info 07 et 08 / 2013

21 dudek unu

Antaŭ ol foriri el la kongresejo, ni volis ĝisi kaj danki William-on.

Li tuj alproksimiĝis al ni kun emocio, kaj, kiam ni lin dankis pro ĉio, kion li faris por ni (mi eĉ petis de li jaŭdon, ke li solvu inund-problemon en iu dormoĉambro, kiun li, kun siaj kutimaj ridetemo kaj efikeco, plene solvis), li mem, kun emociego, dankis nin, ĉiujn esperantistojn ĉeestintajn en la kongreso. Lia voĉo tremetis, li tenis la manon sur la brusto, dirante, ke neniam antaŭe li sentis ion tiom fortan, ke li sentis ion, kio estis pli ol amikeco en la ĝenerala etoso, ke temis ja pri « koro » !

Mi devas diri, ke estis por mi la unua fervojista kongreso, kiun mi ĉeestis, kaj ŝajnis al mi, ke la homoj estas mi diru pli afablaj ol en la aliaj internaciaj kongresoj, kiujn ni ĝis tiam vizitis : dum la tri ekskursoj, nur dan-koj, neniu grumblanto, neniu malagrablulo. Mi eĉ vidis la Rumanon, kulpan pro la malfruo en Sankta-Emiliono, kiu pardonpetis de ui el ni, mardon aŭ jaŭdon. Al la respondo « Ne gravas », li denove petis pardonon, dirante : « Tamen, mi sentas min kulpa », kun vere aflikta mieno.

Kaj, laŭ la opinioj, kiujn mi tie kaj tie aŭdis (kaj la malferma parolado de Rodica), ili eĉ trovis la manĝaĵaĉojn bonaj !...

Sen paroli pri la lasta vespero... Nanne kaj Ankie estas vere ĉarmaj homoj, kaj mi sentis min antaŭenpuŝita al statuso, pri kiu mi neniam eĉ re-vus, kiam ni kantis *Dormu milde*. Tiel la Kompanoj eksciis min, ke mi povas vere kanti !...

Do magia spertaĵo estis tiu kongreso, kiu unue ŝajnis al mi defio, pri kiu mi min demandis, ĉu mi ne estis iom trotaksita (pri la spektaklo, kompreneble, sed antaŭe estis prov-ludoj kaj -kantoj, kaj la spirito de la Kampanoj, kiu kondukas ĉiam pli antaŭen ol tio, kion oni sentas sin kapabla fari, sed ĉefe pri la respondeco de la ekskursoj)...

Dankon al ĉiuj, dankon al Marcelo, kiu finfine akceptis fari tian spertaĵon, nome de ĉiuj.

Janine


Le Transsibérien a fait halte à Cenon

Le 4 mai, à la Médiathèque Jacques Rivière de Cenon, Andrei Grigoriev, journaliste à Krasnoïarsk, nous a fait rêver du Transsibérien, en s'appuyant sur de belles projections: plus de 9000 km de voies ferrées, de Moscou à Vladivostok, et ceci dès la fin du XIXème siècle; une semaine de voyage, pas très cher; des températures ... sibériennes. Pour se nourrir, le wagon-restaurant, mais c'est du luxe; il vaut bien mieux descendre à certains arrêts et se ravitailler sur les quais auprès des habitants qui vous proposent de la nourriture fraîche, des poissons venant de la rivière proche... Dès l'origine, le Transsibérien a inspiré les créateurs, depuis Tolstoï, Jules Verne, jusqu'à Blaise Cendrars ou, en 2010, pour l'année France-Russie, une vingtaine d'écrivains français'. Andrei Grigoriev a fait une seconde conférence à la gare Saint-Jean sur des conditions de travail des cheminots russes. Ils adhèrent

presque tous à un syndicat quasi unique qui les défend bien, et reste vigilant face à la privatisation progressive de la compagnie.

Mais que venait faire ce journaliste sibérien sur notre Rive droite ? Il participait à un étonnant congrès international de cheminots : 250 personnes venues de 26 pays, hébergées à la Maison de la promotion sociale, à Artigues-près-Bordeaux. Mais le plus étonnant: aucun besoin d'interprète; tous échangeaient... en esperanto ! Du temps de l'URSS, l'état soutenait cette langue universelle. Maintenant l'état russe s'en méfie : il préfère diviser, pour mieux assurer son pouvoir. JB

1 dont Maylis de Kérangay dans son roman remarqué: *Tangente vers l'est*.



Andrei Grigoriev

Une langue internationale, ça existe?

La langue espéranto est pratiquée à travers le monde. L'étude de l'espéranto fait aimer, facilite et accélère l'étude des autres langues. Il favorise le plurilinguisme.

L'espéranto est une langue vivante, pratiquée à travers le monde par de nombreuses personnes dans de nombreux domaines culturels ou scientifiques. En 1887, la langue qui deviendra l'espéranto apparaît pour la première fois sous le nom de « Langue internationale ». Son auteur, Ludwik Lejzer Zamenhof, un Polonais avait l'idée de créer une langue dans le but de faciliter la communication entre personnes de langues différentes et aider à avoir la paix dans le monde. Fondé sur une grammaire régulière (sans exception), l'espéranto est une langue « agglutinante » : les mots se forment à partir d'un nombre limité de racines lexicales et d'uffixes. Ces particularités facilitent son apprentissage. L'espéranto est la seule langue construite qui a dépassé le stade de projet pour devenir une langue vivante, avec des locuteurs actifs répartis dans la plupart des pays du monde. C'est une langue qui est

facile à apprendre par rapport aux autres langues. Pour la conjugaison, le présent se termine en -as, le passé en -is. Rapidement accessible à tous, précis, nuancé, adaptable aux évolutions des techniques et des pensées, l'espéranto est un outil d'échange particulièrement efficace entre toutes les cultures. En plus, tout le monde peut l'apprendre gratuitement sur internet, et des universités chinoises et brésiliennes l'enseignent.

Neutre, l'espéranto répond aux idéaux démocratiques de dignité et d'équité, fondés sur la Déclaration des Droits de l'Homme. Pour ses valeurs humanistes, elle est reconnue par l'Unesco. « Les résultats obtenus au moyen de l'espéranto sont évalués dans les échanges intellectuels internationaux et pour le rapprochement des peuples. » Par contre, l'espéranto n'est la langue officielle d'aucun pays, mais il est la langue de travail de plusieurs associations à but non lucratif, principalement des associations d'espéranto.

Pourquoi il ne plaît pas à tous que l'espéranto devienne langue de travail

Européenne? Un petit commentaire a attiré mon attention : de nombreux politiciens de l'Union Européenne sont contre l'espéranto. Je pense qu'ils considèrent cette langue comme une menace contre leur condition bien rémunérée d'hommes politiques. Si l'espéranto devait devenir la langue de travail de l'Union Européenne, ces hommes politiques devraient par conséquent apprendre cette langue, ce qu'ils n'ont ni le temps ni l'envie de faire. S'ils ne l'apprenaient pas, ils seraient remplacés par d'autres confrères. D'après moi, apprendre une nouvelle langue sera un avantage pour trouver un travail, les personnes ayant de bonnes aptitudes linguistiques peuvent apprendre l'espéranto rapidement et le besoin de professeurs d'espéranto sera important. Par ailleurs, on aura toujours besoin de professeurs de langues et de traducteurs. Shan (Chine), d'après l'interview de Laurent Vignaud, un des responsables du Congrès international des cheminots esperantistes (du 4 au 11 mai à la Maison de la promotion sociale à Artigues).

Laŭ ĝenerala opinio, tiu kongreso IFEF/UFE 2013 estis sukcesplena. Kvankam mi superflugis ĝin, mi opinias, ke tio estas prava. Efektive mi nur ĉeestis dum la vesperoj, ĉu por surscene kunludi, ĉu por ĝui animadojn ĉiam agrablajn.

Pro nia malfruo revenante de Sankta Emiliono, mi ne travivis la maltrankvilon de la Kompanoj dum la lasta provludo. Pro tio mi ne dubis pri nia sukceso. Malgraŭ certe kelkaj eraroj kiujn nur ni sciis, la publiko nur vidis neatenditan fabelon en magia etoso. Same por Interkant, fronte al la publiko ni forgesas la timon kaj donas la plej bonon de ni mem. Mi aparte ĝuis kun-kanti Dormu Milde, de longe konata de mi, ĉar mi neniam pensis travivi tiun emocian momenton publike.

Por mi estas ĉiam mirige kiam mi povas eliri de mia timemo.

Dum miaj ekskursoj mi povas diri, ke la etoso inter la kongresanoj kiujn mi akompanis, ĉu kun Joël, ĉu kun Jean-Luc, estis ĉiam bona malgraŭ kelkaj neatenditaj eventoj. Mi pensas pri :

- unua prokrasto (tridek minutoj) de la buso irante al Sankta Emiliono,
- dua prokrasto (denove tridek minutoj) en Sankta Emiliono mem pro rumana amiko kiu perdiĝis en la urbo. Iu en la buso maltrankviliĝis : "Mi ĉefe venis por viziti vinkelon. Ĉu eblus ? ». Tio tamen povis okazi.
- tria prokrasto : nia alveno sur la insulo Patiras. La kaŭzo venis parte de militŝipo kiu parkis antaŭ la ĝeto, malebligante al la ŝipeto albordiĝi por enŝipiĝi nin. Ne gravas, tio donis al ni la okazon surpaŝi tiun ŝipon de la Nacia Floto, helpataj de juna maristaro ! , kiu, de flanko al flanko, transportis ŝtupareton por nia komforto...

Sur Patiras surprizis nin la manĝo « per la pinto de la fingroj », diversa kaj bongusta. Sed ni ne plu havis tempon por surgrimpi la lumturon. Bedaŭrinde !

Por mi estas nur pozitiva travivaĵo.

Monique

De longe, de kiam mi alvenis al Espéranto-Gironde, mi sciis la tekstojn skribitajn de Marcelo, kelkajn jam enmuzikigitajn, sed mi nur hodiaŭ komprenas la sencon de la magia fabelo de tiu infana revo.

Aparte mi multe ŝatis »Dormu milde », la solan kiun, parole kaj muzike, mi tuj enkapigis kaj ofte kantis en mia kapo.

Mi multe ŝatis ludi kun la gekamaradoj, despli ke mi neniam sciis bone teatrumi. La gaja etoso, tamen laborema, kiun ni kune travivis restos por mi, same kiel por « Oĉjo Georges » en kiu mi partoprenis, belegajn kaj emociplenajn memorojn.

Mi estas feliĉa aparteni al tiu esperanta grupo, ne multa sed unuigita, kiu valorigas la riĉecon de la laboro de Marcelo.



Monique

Il est vrai que 2 heures avant la représentation de notre spectacle, rien n'était gagné !

Le filage n'avait rien d'une "générale" et encore moins d'une "colonelle" comme on dit dans notre jargon musical.

Je me suis raccrochée à l'idée que lorsqu'une "générale" est ratée, le spectacle sera réussi ! et surtout au maître mot de Thierry : "CONCENTRATION".

Je félicite Marcelo pour son sang froid et son calme et surtout pour la confiance qu'il a eue en chacun de nous.

Je me suis appuyée sur chacun d'entre vous et vous me l'avez toutes et tous rendu. Il n'y a eu que bienveillance entre nous et c'est ce qui fut notre force. Même Brigitte et Claudine derrière leur "isoloir" ont été soutenantes.

C'était pour moi la première expérience avec les kompanoj et j'espère que ça ne sera pas la dernière.

Morine